
# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 1 Januaro, 2017


*Karaj niaj Legantoj, feliĉan Novan jaron! Dankon al vi ĉiuj, kiuj restis kun ni dum lasta jaro aŭ dum nur kelkaj monatoj de la pasinta jaro. Ni strebis fari nian periodaĵon regulan, belsapektan, enhavriĉan. Ni ankaŭ esperas aperigi en Majo 2017 150 (!) numeron de la bulteno, kiu estis farita por vi dum pli ol 12 jaroj monate seninterrompe. Restu kun ni! Dankon!*

–La Redaktoro

## Zamenhofa Tago 2016

Malgraŭ frosta vetero kaj unua densa neĝo en Ŝikago, la evento arigis dek personojn, kiuj ĝuis la festan atmosferon de la Zamenhofa Bankedo ĉi jare. La evento okazis en ŝikaga "Malnovurba Kvartalo" (Old Town), en la luksa salono de la "Ŝuista Placo" (Cobbler Square), danke al nia redaktoro – Viktoro. Bele ornamita komforta ejo kun kameno pleniĝis ne nur de la varma esperantista etoso, sed ankaŭ per la odoroj de la bongustaj varmegaj manĝaĵoj, menditaj en la apuda itala restoracio "Orso's": molaj aromaj viandoj kun rostitaj terpomoj, fungoj kaj salatoj. Abundis trinkaĵoj, kaj eĉ ŝaŭmvino kunportita de Viktoro, per kiu ni tostis al D-ro Zamenhof. Ni havis la honoron gastigi la Konsulon de la Pola Respubliko, s-ron Robert Rusiecki, kiu en sia parolado esprimis varmajn vortojn pri Esperanto. Interese, la Konsulo rakontis pri siaj personaj ligoj kun Esperanto ekde lia infanaĝo en Varsovio. Komuna kantado de nia himno "La Espero" (sur la foto), akompanata de la poŝtelefona muziko aranĝita de nia estrarano Hanso, konkludis la festoon (pluraj fotoj estas en nia retejo kaj MeetUp paĝo).



*–Les Kordylewski, ESC Prezidanto*

## Aperis nova E-libro: "Fundamento de la Homaj Rajtoj"

La 16-an de decembro, 2016, UEA aperigas belan poŝformatan libreton "Fundamento de la homaj rajtoj", okaze de grava datreveno. Antaŭ precize 50 jaroj, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) akceptis du gravajn internaciajn traktatojn, ili estas la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, kaj la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj. Per tiuj jure devigaj interkonsentoj, al kiuj intertempe formale aliĝis pli ol 160 landoj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ricevis pliajn detaligadojn kaj konkretigon sur diversaj esencaj kampoj de la homa vivo.

Esperanta traduko de la Universala Deklaracio ekzistas jam de multaj jardekoj, kaj estas legebla en la UN-retejo. La du Paktoj, tamen, aperas nun unuafoje en Esperanta traduko. La tradukadon faris d-ro Humphrey Tonkin, iama UEA-prezidanto kaj gvidanto de ĝia Novorka Oficejo, kaj liajn tekstojn kontrolis Brian Moon, profesia tradukisto ĉe Eŭropa Komisiono. Ĉiuj tri tekstoj estas kunigitaj en la libreto, kiu inkluzivas antaŭparolon de la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes, kaj kleran enkondukan eseon de d-ino M. Rafaela Urueña, profesoro pri la internacia juro.

"Ĉi tiu libreto estas omaĝo al la longa komuna historio de Esperanto kaj la homaj rajtoj en monda skalo", klarigas d-ro Fettes. "Eldonante libroforme la tekstojn de tiu triparta fundamento de la homaj rajtoj, ni esperas rekonsciigi esperantistojn pri ilia graveco, kaj fari plian modestan kontribuon al iliaj diskonigo kaj efektivigo."

*–UEA*

## ESF Raportas *de Humphrey Tonkin, ESF Prezidanto*

La jaro 2016 estis sukcesa kaj eventoriĉa jaro por ESF. Nia Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) havis aparte grandan nombron de partoprenantoj; niaj stipendioj helpis al pluraj studentoj partopreni la interlingvistikajn kaj esperantologiajn studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando); nia regula subteno ☞

helpas kreski al Edukado.net, la plej grava internacia retejo por Esperanto-instruistoj. Ni subtenis konferencojn en Usono, Italio kaj Slovakio, kaj ni provizis financadon por la staĝanto en la novjorka oficejo de UEA. Novjorko ankaŭ fariĝis la loko por la simpozio pri lingvoj kaj disvolvado, celita al la konsciigo pri la graveco de lingva egaleco en la homa evoluo kaj homaj rajtoj. Nia esplorprogramo, interalie, helpis subteni novajn esplorilojn, kiel *Historio de la Esperanto-Literaturo*, kaj la sociologian studo pri UEA.

ESF havas du paralelajn celojn: subteni la esplorojn pri Esperanto kaj lingvaj aferoj ĝenerale, kaj ankaŭ subteni Esperanto-rilatajn edukprogramojn. Ni laboras kiel dek-membra estraro kun trideko da konsilantoj pri lingvopolitiko, lingvoplanado kaj rilataj kampoj. Ni atente elektas niajn esplorprojektojn, subtenante rekonitajn universitatanojn, kaj niaj edukprogramoj estas inter la plej elstaraj kaj ĝisdataj en la mondo. Fakte, neniu alia Esperanto-rilata organizo havas pli fortajn programojn por subteni la altnivelan esploradon kaj provizi gravajn servojn al Esperanto-parolantoj. La forto de ESF estas, interalie, en la forto de nia estraro: ekzemple, inter niaj estraranoj estas Esther Schor, Universitato Princeton -- la aŭtoro de *Ponto el vortoj*: Esperanto kaj la revo pri universala lingvo (2016), kiu ricevis aparte bonajn recenzojn en la lastaj kelkaj semajnoj; Mark Fettes estas prezidanto de UEA, kaj mi lastatempe kunredaktis la specialan numeron de la scienca revuo INDECS dediĉitan al la fenomeno de Esperanto. Alia nia estrarano, Derek Roff, proksime kunlaboras kun CALICO (Komputile Subtenata Lingvo-Instrua Kunlaborantaro), kie ESF sponsoras prestiĝan ĉiujaran premion.

Je la fino de 2016 kaj la komenco de la nova jaro ni vidas kelkajn gravajn ŝanĝiĝojn en la mondo kaj ankaŭ en la Esperanto-movado. Nia fondaĵo forte laboras por kompreni tiujn ŝanĝiĝojn kaj por maksimumigi la eblojn ne nur antaŭenigi Esperanton, sed ankaŭ por atentigi la homojn pri lingvoj kaj la lingvodiverseco en la mondo. Dum la tradiciaj Esperanto-organizoj laboregas por teni siajn poziciojn, la Esperantoparolanta komunumo, kiel la tuto, kreskas, kaj ESF ludas gravan rolon en tiu ĉi kresko. Por subteni tiun impulson oni devas antaŭeniri rapide kaj decidite.

Antaŭ iom da tempo nia fondaĵo estis ĉe la komenco de la lanĉo de Lernu.net, la programo, kiu nun havas pli ol 230 mil registritajn membrojn kaj kies retejo estis relanĉita ĉi-jare. Ni proksime sekvas la sociajn retojn, dum la kvanto da Esperanto-parolantoj altiĝas ĉe Facebook kaj en aliaj retoj, kaj pere de Duolingo. Se antaŭe oni devis aliĝi al tradiciaj Esperanto-organizoj por aliri la Esperanto-komunumon, la novuloj hodiaŭ povas fariĝi aktivaj esperantistoj tuj, preterirante la tradiciajn organizojn. ESF laboras por pritaksi tiun ĉi influon, kiun portas la novaj esperantistoj, kaj engaĝi ilin kiom eble plej multe en la praktikan uzon de Esperanto.

Dank'al la forta subteno de homoj ene de la Esperanto-komunumo kaj preter ĝi, ni povas respondi. Dum nia buĝeto kaj la programoj kreskas, estas tre grave ke kresku ankaŭ nia subteno. Bv. konsideri subteni unu el la plej sukcesaj kaj influaj organizoj en la Esperanto-mondo hodiaŭ. Ni esperas, ke ankaŭ vi estos kontribuantoj al nia fondaĵo en tiu tre grava tempo. Dankon pro via fido en 2016 – ni kalkulas je via subteno de nia laboro ankaŭ en la jaro 2017 kaj poste. Feliĉajn Festojn!




## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**24an de Januaro 7:00-9:00pt** – Kaliforniaj Vitejoj

**28an de Februaro 7:00-9:00pt** – Temo estos anoncata

## Ĝoje!



Elkore kaj sincere ni salutas nian eksan vic-prezidanton d-ron Puramo Chong okaze de la naskiĝo de lia nepino (sur la foto)! Sanon al la tuta familio! Interese, kiu estos ŝia la unua vorto: korea aŭ Esperanta? Ĝis esperebla renkonto dum la UK en Seulo.